



CONCORDE

Organe Culturel

NICA STELO

Direktoro :

Hubert FERÉZ

7, Avenue de Reims
NICE (Francujo)

Abonprezo : 2 F

Subtenabono : 5 F

NICE - ESPERANTO - COTE D'AZUR

C. C. Postal TOULOUSE 632.15

N° 11 (Deuxième série)

TRIMESTRIEL

Januaro-Marto 1966

ESTONTA RENKONTIĜO EN CUNEO (ITALUJO)

Ni estas organizantaj franc-italan renkontiĝon en la itala urbo Cuneo, kie nova esperantista grupo fondiĝis sub la gvidado de S-ro Orlandini, el Mondovi.

Detalan programon pri tiu manifestacio, kiu okazos la 23-an, 24-an kaj 25-an de aprilo 1966, akurate ricevos la esperantistaro el Nice kaj ĉirkaŭaĵoj.

La ceteraj esperantistoj, por ricevi informojn, estas petataj skribi al nia samideano S-ro Ed. Pomérol, Villa Mirazur, Rue de Jussieu, en Nice.

Ed. P.

Chers Lecteurs, non espérantistes,

Vous qui avez en mains ce bulletin, vous êtes déjà tout de coeur avec nous, car vous désirez ardemment que les peuples puissent enfin directement se comprendre et s'estimer; et qu'ils s'entendent pour travailler ensemble à l'édification d'un monde nouveau, fondé sur une Paix durable et une collaboration fraternelle.

Vous aspirez à oeuvrer à cette évolution culturelle et économique, car - par la suppression progressive des budgets de guerre qui pèsent si lourdement sur l'économie des nations - elle assurera à tous un standard de vie infiniment supérieur et permettra les réalisations sociales les plus belles. Et à la jeunesse, elle apportera enfin la sécurité de l'avenir.

Mettez-vous donc, Chers Amis, immédiatement au travail ; que vos aspirations ne restent pas lettre morte ! Oeuvrez à la réalisation de cette entente, de cette fraternisation que vous-mêmes vous désirez, en étudiant dès maintenant l'Espéranto et, demain, en le pratiquant !

H.F.

PROVENCA FEDERACIA KONGRESO

Ce Congrès Régional se tiendra à SOLLIÈS-TOUCAS, dans le Var,
les 21 et 22 Mai 1966.

ASSISTEZ NOMBREUX A CETTE MANIFESTATION!

Le Gérant : Hubert FERÉZ.



NOTRE ENSEIGNEMENT DE L'ESPÉRANTO A NICE

Cet enseignement est gratuit. Il est dispensé, selon les convenances de chacun, de deux façons :

a) Cours publics donnés à la Chambre de Commerce, Boulevard Carabacel. Professeur : M. N. Pazzini.

b) Cours par correspondance, fonctionnant toute l'année.

Pour l'inscription à ces cours, écrire, en joignant une enveloppe timbrée pour la réponse, à : Espéranto, 7, Avenue de Reims, Nice.

SENPAGAJ ESPERANTO-KURSOJ POR PREPARADO AL LA "EKZAMENO PRI KAPABLECO"

Ĉiumerkrede, de la 20-a horo ĝis la 21-a, en la Komerca Ĉambro, superaj kursoj okazas por preparado al la "Ekzameno pri Kapableco". La kursoj estas farataj tiamaniere, ke oni je ia ajn dato povu enskribiĝi, por ilin sekvi. Profesoro : S-ro Hubert FÉREZ.

PRIPENSU! Kiu ne scias kaj ne scias, ke li ne scias, tiun evitu!
Kiu ne scias kaj scias, ke li ne scias, tiun klarigu!
Kiu scias kaj scias, ke li scias, tiun sekvu!

HUMORO

Jurista ekzameno. - Profesoro : Kio estas la puno por bigamio ?

Kandidato : Du bopatrinoj!

Diferenco. - Kio estas la diferenco inter moderna kaj malmoderna knabinoj ?

Respondo : Malmoderna knabino ruĝiĝas, kiam ŝi hontas... kaj moderna knabino hontas, kiam ŝi ruĝiĝas!

Internacia Esperanto-Klubo Aŭtomobilista. - La Internacia Esperanto-Klubo Aŭtomobilista estas starigita je iniciato de la Komitato de U.E.A. kaj akceptas, kiel membron, ĉiun posedanton de aŭtomobilo, kaj, kiel abonanton al la Revuo, ĉiun samideanon, kiu interesiĝas pri la iniciato. - La kotizo (por aŭtanoj), kiu inkluzivas la abonon ; aŭ la abonprezo (por ne-aŭtanoj) estas : Belgaj Frankoj 50 (UNU dolaro ; 14 steloj), kiujn oni povas pagi al la P.Ĉ. n-ro 1700.10 de Maur. JAUMOTTE, De Bruynlaan 44, WILRIJK-Antverpeno (Belg.) aŭ per steloj aŭ per respondkuponoj, kiuj valoras B.Fr. 6. Ankaŭ per bankĉeko, sed en tiu okazo oni plialtigu la sumon pagotan per 10% pro la, proporcie, altaj bankkostoj. - D-ro H. CORYNEN.

ESPERANTO EN RADIO

Ĉiutage : 16^h30-17,00 - Warszawa (Pollando), 200 m (1502 kHz), 50,42 m, 49,96 m, 42,11 m, 41,99m, 41,18 m, 31,45 m (laŭ MET).

DIMANĈE : 11,50-12,00 - Natal (Brazilo), 236 m ; 16,30-17,00 - Warszawa (Panoramo de internaciaj eventoj kaj Esperantista magazino "Sub la Verda Stelo") ; 17,35-17,50 - Roma (Italujo), 41,24 m, 31,33 m ; 6. Italaj verkistoj : Luigi Capuana ; 13. Italaj regionoj : Umbrio ; 20. Italaj pentristoj : Tranquillo Cremona ; 27. Leterkesto.

LUNDE : 00,30-00,55 - Sofia, 41,35 m, 48,62 m ; 00,45-01,00 - Rio de Janeiro, 441 m, 92,30 m, 60,30 m ; 13,00-13,08 - Bern, 31,46 m, 48,66 (D-ro A. Baur) ; 16,30-17,00 - Warszawa : Felietono pri politika, socia, ekonomia, kultura, ofte ankaŭ priesperanta temo ; ĉiun duan semajnon Scienca Tribuno ; 19,00-19,15 - Valencia, 193 m ; 19,00-19,30 - Budapest, 240 m kaj 48,10 m (nur la lastan lundon de monato) ; 23,40-23,55 - Hilversum, 298 m, nur la unuan lundon de ĉiu monato.

En la tre baldaŭa venonta numero aperos la ceteraj programoj : marde (Warszawa, Wien) ; merkrede (Gdansk en Pollando, Bern kaj Warszawa) ; ĵaŭde (Bilbao, Warszawa, Praha kaj Bern) ; vendrede (Zagreb, Warszawa, Pekino kaj Hilversum) ; sabate (Warszawa, Rio de Janeiro dufoje, Pekino kaj Bern).

Vortoj de la «presisto»

1-e) Mi tre sincere kaj humile pardonpetas pro la prokrasta apero de ĉi tiu numero, sed mi ne povis ĝin presi pli frue, sekve de esceptaj cirkonstancoj, tute ne dependaj de mi! Malgraŭ tiuj "cirkonstancoj" mi plue donis ĉiusemajne, kiel kutime, proks. 21 horojn da E.-kursoj en diversaj liceoj kaj kolegioj de Orléans, Vierzon, Montargis kaj Pithiviers (Operacio "L'Espéranto à l'école" de Centre National Espéranto-Office).

Havante nur unu kapon, du brakojn kaj du kruojn, mi ne povas ĉion fari samtempe.

Aliparte, oni bone notu, ke la ofseta "presejo" de Centre National Espéranto-Office ne estas entrepreno, sed servo, kiun profitas eĉ tiuj, kiuj absolute neniam subtenas nian "Espéranto-Office" kaj ĝian "Kampanjon"...

Ofsete presi bultenon, eĉ etan, postulas pli da laboro, ol kredas la nefakuloj. Kaj la etaj fakturoj, kiujn ni sendas, ĝenerale apenaŭ repagas la pres-kostojn (papero, inko, kliŝoj, ktp.). Doni tiujn precizaĵojn, ŝajnas al mi necese.

Por ke oni pardonu al mi tiun gravan prokraston ĉifoje, mi decidis ne pagigi tiun 11-an numeron kaj presi ĝin sur luksa kolora papero.


2-e) Laŭ tre afabla peto de nia kara amiko S-ro Hubert Férez, mi indikas ĉisube la ĉefajn verkojn aĉetebajn ĉe "Espéranto-Office". Kiel mi, S-ro Férez bedaŭras, ke tro multaj esperantistoj tute ne interesiĝas pri la legado de bonaj Esperantaj verkoj malgraŭ, ke estas absolute neeble fariĝi lerta aŭ kompetenta esperantisto "ekster la gramatiko kaj la literaturo"...

Ni tamen esperu, ke ĉiam pli kaj pli multaj esperantistoj fariĝos libro-amatoroj. Eble, kelkaj neniam havis precizajn informojn aŭ ne konservis ilin.

3-e) Mian tre koran dankon al S-ro Férez pro lia bonega kompreno pri multaj aferoj, kiuj koncernas nian "Espéranto-Office" kaj nian "Kampanjon"!

Kaj amikajn salutojn al ĉiuj!

Pierre DELAIRE,

Direktoro de Centre National Espéranto-Office. 

OUVRAGES UTILES et DISQUES DE PRONONCIATION pouvant être achetés par correspondance. - Pour tous les ouvrages ci-dessous désignés, veuillez adresser vos commandes, avec les fonds, à : M. Pierre DELAIRE, Centre National Espéranto-Office, 9 Bis, Rue du Commandant-de-Poli, à ORLÉANS (Loiret). C.C.P. DELAIRE Pierre, n° 271-69 ORLÉANS.

==

L'ESPÉRANTO VIVANT, par Pierre Delaire. Grammaire et méthode directe. 352 pages 22 x 15 cm, relié, abondamment illustré. Complet, moderne et pratique. Manuel encyclopédique pour apprendre seul l'Espéranto et le parler couramment au bout de quelques mois. Convient aux débutants, aussi bien qu'à ceux qui veulent se perfectionner et entreprendre des études espérantistes supérieures. 7^e édition, venant de paraître, sous une belle reliure et une couverture verte, brillante, plastifiée. Prix franco : 22 francs.

L'ESPÉRANTO, FIL D'ARIANE DU COEUR ET DE L'ESPRIT (Espéranto, Ariadna fadeno de l'koro kaj de l' spirito), du même auteur. Etude complète sur l'Espéranto. Textes français et Espéranto juxtaposés, avec remarques linguistiques pour les deux langues. 1 beau volume 21 x 13,5 cm, illustré, de 196 pages. Préface du Pr Lavarenne. Prix franco : 15 francs.

LUDOVIKO EN NEDERLANDO, du même auteur. Cours de perfectionnement et cours supérieur. 1 beau volume 21 x 13,5 cm, de 204 pages. Prix franco : 17 francs.

L'EDELVEJSO KAJ LA TRI VAGABONDINOJ, du même auteur. Petite pièce pour débutants, suivie de LA AMO, citations littéraires, françaises et étrangères, classiques et modernes, traduites en Espéranto. 1 brochure 21 x 13,5 cm, illustrée, de 56 pages. Prix franco : 4,25 Fr.

TRA LA MONDO, par André Ribot, cours sur disques, excellent et incomparable complément de "L'Espéranto vivant", comprenant 48 lectures, enregistrées par des Espérantistes de 12 pays différents. Ces lectures sont présentées avec de nombreuses illustrations en couleurs; et elles sont traduites, avec des explications grammaticales.

Le cours complet (6 disques micr. 45 T, 7 livrets de cours et 1 Précis Grammatical, le tout sous emboîtement couleur) : 85 Fr. franco. - Prix franco des 6 disques achetés seuls : 43 Fr. ~~franco~~ - Prix franco des 7 livrets achetés seuls : 48 Fr.

DISQUES micr. pr la prononciation parfaite de l'Espéranto, 2 disques 45 T. Les deux : 10 Fr.

LA ETA PRINCO (Le Petit Prince), par Antoine de Saint-Exupéry. Traduction espérantiste de Pierre Delaire. Illustré. 102 pages. Format : 21,5 x 15,8 cm. Prix franco : 16 francs.

DICTIONNAIRE FRANCAIS-ESPÉRANTO, par Léger-Albault. Complet, facile à consulter. Nombreuses annexes sur papier couleur. 736 pages, 16 x 12 cm, relié toile. Prix franco : 22 Fr.

GRAND DICTIONNAIRE ESPÉRANTO-FRANCAIS, par G. Waringhien, Agrégé de grammaire. Un incomparable instrument de travail. 368 pages, 19,5 x 13,5 cm, relié toile. Prix franco : 35 Fr.

PLENA VORTARO DE ESPERANTO, dictionnaire complet, international, "Espéranto-Espéranto". Un genre de Larousse où chaque mot est expliqué entièrement en Espéranto, avec des exemples et des remarques grammaticales. 576 pages, 17,6 x 12 cm, cartonné. Prix franco : 22 Fr.

FUNDAMENTO DE ESPERANTO, de Zamenhof, en 5 langues (franç., angl., all., russe et pol.). Ouvrage de fondamental. Commentaire et explications linguistiques par le Dr Albault, de l'Acad. Esp. 366 pages, 21,8 x 15,8 cm. Relié toile : 16 Fr. franco ou broché : 11,50.

LINGVAJ RESPONDOJ, réponses linguistiques de Zamenhof, ordonnées et complétées par le Pr Waringhien, Prés. de l'Acad. Esp. 134 pages, 20 x 13 cm. Relié : 11 Fr. ou broché : 8,00.

SERIE DE DIX LIVRES ILLUSTRÉS POUR ENFANTS et débutants espér. Couverture cartonnée pour chaque livre; Le tout richement illustré en couleurs. Les 10 petits livres : 10 Fr. franco.

GVIDLIBRO TRA PARIS, par Julieta. 250 pages, 14 x 21 cm, avec 33 dessins à la plume, 28 photos et 13 plans et croquis. Couverture luxe 4 coul., plastifiée. Prix franco : 13 Fr.

HAMLETO, de Shakespeare. Magistrale traduction de Zamenhof. Relié toile, avec illustrations hors texte. Sur papier ordinaire : 14 Fr. franco. Sur papier de luxe : 17 Fr.

Le Dr Esperanto, par Ziolkowska. Vie de Zamenhof, en franç. 168 p. Relié. Franco : 15 Fr.

Sen eliro et La respektema P., de Sartre, trad. Bernard. 111 pages. Prix franco : 8,60 Fr.

La kunprinclando Andoro, de Bacquer, trad. Ribot. 60 photos. Prix franco : 8,75 Fr.

Carnets de 20 Vignettes "Apprenez l'Esp.". 1 carnet : 2 Fr. franco.

COURS PARTICULIERS PAR CORRESPONDANCE, par Pierre DELAIRE, auteur des méthodes classiques d'Espéranto (3 degrés). Séjours gratuits en Hollande et en Yougoslavie pour les lauréats du concours de fin d'année scolaire. Demandez la documentation sur ces cours au Centre National Espéranto-Office, 9 Bis, Rue du Cdt-de-Poli, 45 - Orléans.

Un bel ouvrage en préparation

LA DOLÇA FRANCLANDO, par Pierre Delaire Paraftra en 1967.

PRAKTIKU ESPERANTON ----- kaj legu multajn bonstilajn Esperantajn verkojn!

LA BELLE HISTOIRE DE LA CROIX ROUGE EN ESPERANTO

Teksto liverita de Unesko. Esperanta traduko de Pierre Delaire. Desegnoj de Jean Bernadac.

"Oni ne faras omleton sen rompi la ovojn". Tiun spritaĵon li oficiro jetas en la ĉeesto de Henry DUNANT. Kiu estas Henry Dunant? Li estas Juna svisa civitano serĉadanta Napoleoneon la III-an dum la batalo apud Solferino en Italujo en junio 1859.



Kia estas lia celo? Ĉu militista? Ĉu strategia? Ĉu politika? Tute ne: li simple volas konstrui muelejojn en Algerio. Li bezonas la permeson de la Imperiestro. La tempo ja estas malfavora: Ĉie flua, la sango. Mortis 40.000 homoj.




Tia estas la milito! Dunant estas skuita. Li tute forgesas siajn muelejojn kaj la Imperiestron; kaj li organizas volan helposervon. Per siaj propraj manoj li flegas pli ol 1.000 aŭstriaĵn, francajn kaj italiajn vunditojn.




Al tiuj, kluĵ miras, li respondas: "Ĉiuj estas miaj fratoj, eĉ niaj malamikoj." Tiuj tri tagoj decidigas la orientadon de lia tuta vivo. Li havas 31 jarojn.



Reveninte en Ĝenevo, Dunant decidas, ke li instigos ĉiujn landojn krei por helpo al la vunditoj societon, kies agado estos dum milito agnoskita de ĉiuj Ŝtatoj. Poste li verkas libron: Memoraĵo pri Solferino. Tiu emociega temo ekscitas la konsciencon de Eŭropo. Victor Hugo skribas: "Vi savas la homaron"; kaj Dickens: "... aregoj da bonkoruloj respondos al lia alvoko."




En ĉi tiu etoso kvar influaj viroj, Svisoj, decidas grupiĝi ĉirkaŭ Dunant. Ili estas: iu generalo, Guillaume-Henri Dufour; iu advokato, Gustave Moynier; kaj du kuracistoj: Théodore Maunoir kaj Louis Appia. Tiu "komitato" de la kvin" kunvenas por la unua fojo la 17-an de februaro 1863. Kaj la 26-an de oktobro de la sama jaro la delegitoj el 16 landoj kunvenas en Ĝenevo: ili sankcias la projektojn de la Komitato kaj adoptas emblemon: tiam naskiĝas la Ruĝa Kruco.



La unua Konvencio de Ĝenevo por plibonigo de la stato de la militistoj vunditaj en la militantaj armeoj estas subskribita en 1864. 1870-71: Francujo kaj Pruslando intermilitas. La Ruĝa Kruco ĉeestas sur ĉiuj batajkampoj. Pli, ol 150 memvuloj varbiĝas. El Anglujo oni sendas 12.000 materialkestojn kaj pli ol 7 milionojn da svisaj frankoj, kiel helpemon. Dunant trairas la pafadlimon.



1899 - Transvalo : Okazas la "Boer"-milito. Tie ĉeestas la Ruĝa Kruco. En Eŭropo dum tiu tempo juristoj laboras por kodigi la principojn de la humana juro kaj adapti ilin al novaj cirkonstancoj. En 1907, en Hago, tiuj principoj estos etenditaj al la surmara milito.




1904 - Ankorau milito, japan-rusa ĉifoje. Sed Rusujo kaj Japanujo estas membroj de la Ruĝa Kruco jam de multaj jaroj. Ambulancoj estas instalitaj sur la bordoj de la rivero "Yalou" en Koreo.




Post la milito en Balkanoj en 1912-13, jen la granda milito de 1914. Ne plu armeoj sed tutaj popoloj alfrontiĝas.



Evakuitaj francaj civiluloj pasas tra Genevo; ili ricevas helpon de la Ruĝa Kruco. 450.000 malsanuloj kaj vunditoj estas interŝanĝitaj per ĝiaj klopodoj...



500.000 militkaptitoj estas repatriĝitaj per ĝi, post kiam vizitis ilin en la kampoj delegitoj, el kiuj S-ro Eugster, ĉisupre staranta en kampo de germanaj militkaptitoj.



1919 : En tiu jaro kreiĝas la "Ligo de la Societoj de la Ruĝa Kruco", internacia federacio, kiu grupigas ĉiujn landajn asociojn. Kelkaj islamaj ŝtatoj adoptis, kiel emblemon, la "Ruĝan Lunarkon", dum Irano adoptas la "Ruĝajn Leonon kaj Sunon".




La milito estas finita, sed multaj mizeruloj restas helpotaj. En 1921 regas malsatego en Rusujo, en vastegaj regionoj. Centoj da miloj da malsategaj kamparanoj foriras por serĉadi nutron. Kun siaj ĉaroj tirataj de ĉevaloj, bovoj kaj iafoje kameloj, ili, atakitaj de malvarmo kaj malsato, defilas en la stepo en longaj mizeraj procesoj. Tiu dramo estigas eksterordinarajn sindonojn.



Ekzemple, tiu rusa kuracisto, kiu estas subfosita de tuberkulozo kaj al kiu restas nur kelkaj jaroj por vivi, petas, ke oni sendu lin al trafitaĵ regionoj, por ke lia vivo estu pli utila al la homoj.




La Ruĝa Kruco, kiu preterlasas nenium mizeron, ĉeestas en "Gran Chaco" en 1933, en Etiopio en 1935-36, en Hispanujo en 1936-39 kaj, ek de 1936, en Ĉinujo, kie estas milito laŭlonge de la fama Ĉina Murego.




Sed gravas ne nur la vunditoj. La Ruĝa Kruco ankaŭ klopodas por prinformi la familiojn de la militkaptitoj kaj malaperintoj. Tio ne estas ĉiam facila afero. Iu familio skribas: "Donu al ni novaĵojn pri nia filo Jean Martin." Nul estas antaŭnomataj Jean. Tamen fine oni trovas precize tiun "Jean Martin", kiun oni serĉis.




La milito de 1939-45 ruinigas la mondon. Tiun ĉi fojon la sliparoj konsistas el 53 milionoj da dosteroj. Laŭ la landoj varias la helpemetodoj. En la neĝo de Lapujo oni uzas nordajn cervojn por tiri la sledojn, kiuj transportas la vunditojn.





Antaŭ la amplekso de la armita konflikto la Ruĝa Kruco uzas grandajn rimedojn. Ĝi luas 40 ŝipojn por la transporto de la helpmaterialo kaj la interŝanĝoj de militkaptitoj.



En Ĝenevo la Centra Oficejo de la Militkaptitoj estas vera uzino donanta laboron al pli ol 3 000 personoj komisiitaj por ekzameni, klasifiki kaj transdoni la mesaĝojn. Ĝi ĉiutage ricevas inter 50.000 kaj 60.000 da liaj, lafoje preskaŭ nelegeblaj, malbone skribitaj sur ĉifitaj paperoj.



Jen ekzemplo : iu itala militkaptito fetas el veturanta vagonaro paketon da bulgariaj cigaredoj; sur kiu li skribis sian nomon kaj tiun de siaj kamaradoj. Tiu paketo, trovita kaj kaptita de iu anonimulo, alvenas al la Oficejo de la Ruĝa Kruco, kiu informas la interesatajn familiojn.



Trajnoj veturas tra Eŭropo, ĉien alportante medikamentojn, porvivafojn, vestojn, leterojn, ktp.

La kampoj de militkaptitoj ricevas la helpon de la Ruĝa Kruco. Kiel efikoplena helpo! Efektive, en tiuj kampoj estas nur 10% da mortintoj, dum en la nehelptaj kampoj de politikaj malliberuloj la mortintoj estas : 90%.


Amasoj da pakajoj, valorantaj tri miliardojn da svissaj frankoj, estas staplitaj en Genevo kaj sendataj en ĉiujn angulojn de 1^a mondo. Inter 1940 kaj 1944 la Internacia Komitato sendis preskaŭ 20 milonojn da pakajoj al militkaptitoj kaj civilaj malliberuloj.



1960 : Sismo en Maroko. La urbo Agadir estas tute detruita. 18.000 homoj ne havas plu loĝejon.
1962 - Irano : la tero denove tremis. La vundita lando ricevas el 47 landaj asocioj de la Ruĝa Kruco donacojn valorantajn 9 milonojn da svissaj frankoj.

Libroj kompletaj estus necesaj por priskribi la tutan agadon de la Ruĝa Kruco. Tage kaj nokte tra la mondo paca armeo de 150 milonoj da homoj atente gvatas. En ĉiu lando la volontuloj de la Ruĝa Kruco estas trejnataj por sia laboro...

La milito ĉesis, sed en la sinistraj urboj de Germanujo, Francujo, Polujo, Japanujo, ktp. la viroj kaj virinoj de la Ruĝa Kruco laboras. Ili ĉeestas en Hungarujo en 1956, en Cipro, en Kubo, en "Laos", ktp. En Kongo en 1960-61 aviadiloj alportas ŝarĝojn de medikamentoj kaj porvivafoj.



Ĉiuj rimedoj eĉ la plej modernaj estas uzataj : flegistinoj paraŝutistinoj, dresitaj hundoj, ŝipoj, aviadiloj, helikopteroj... La infanoj ankaŭ partoprenas en tiu kampanjo sub la egido de la "Ruĝa Kruco de la Junularo", kies devizo estas : "Sano kaj Vivo antaŭ ĉio; Internaciaj interhelpo kaj amikeco".

Ĉi ĉeestas la Ruĝa Kruco. Ĝi deforas en la lernejoj kaj uzinoj, sur la aŭtovojoj kaj konstruejoj, en la fundo de la minejoj, sur la havenoj kaj aerodromoj, sur la sportejoj kaj sablobordoj... Arde aspirante fratecon, ne distingante rasojn, klasojn kaj religiojn, ĝi mobilizas de ekstreme de 1^a mondo al alia ĉiujn bonvolulojn, malfermante vojon al pli bona estonto. (UNESKO-Infojmoj).